



NORMANDA ESPERANTO BULTENO

N° 271

Majo 2018

Redaktas : Yves Nicolas, 14 place Laënnec, 14 000 Caen. Tel. 06 44 87 22 48
ivnicolas@sfr.fr Enpaĝigas : Michèle Langeois

Abon-kotizo : 10 €. « Esperanto – Normandie ». C. C. P. 283.40 H Rouen

Kasistino : Sylvie Caron, 44 rue Gustave Lennier. 76600 Le Havre



ENHAVO



- P. 1** : Enhavo, frontartikolo, Grésillon.
P. 2 et 3 : "La Kompanoj" kantis en Normandio
P. 4 : la recepto de Brigitte, la krucvortoj de Madelaine, historieto de Christian.
P. 5 à 12 : Dosiero : ĝenerala asembleo en L' Aigle la 16an de Junio..
P. 5 : Kiel kunveni en L' Aigle ? plano.
P. 6 : Programo ; " les hommes fourmillent " solvo de la krucvortoj
P. 7 : Morala raporto ; rapport budgétaire ; liste des adhérents à jour au 1er Mai.
P. 8 Zdravka kaj Normand el Kebekio prelegos en L' Aigle.
P. 9 : l' émigration percheronne du 17ème s. au Canada par L. Dutertre.
P. 9, 10 et 11 : la manufacture Bohin. Bohin et le Patoiglob; le Café polyglotte à Hérouville Saint Clair. Gérard Sénécal
P. 12 : Inscription à l' A.G de L' Aigle le 16 juin

KIAL DEKDU PAĜA BULTENO ?

En marto, la triopo « La Kampanoj » regalis nin per belaj kantoj de Brel en Esperanto dum tri etapa turneo en Normandio. Organizi tian aranĝon estis nova sperto por nia regiona asocio. Ĉar ĝi plene sukcesis kaj pruvis, ke « Esperanto Normandie » kapablas starigi allogajn aranĝojn, ni esperas viajn subtenon, kontribuon kaj proponojn. La « Normanda Bulteno », ĝenerale ok paĝa, tiun fojon entenos kvar pliajn paĝojn por detaligi la Ĝeneralan Asembleon okazontan en L' Aigle la 16an de junio. Tiu tradicia rendevuo de nia normanda asocio ĉi-jare estos aparte interesa pro ampleksa kaj riĉa programo. Elkovru ĝin kaj aliru la lastan paĝon por tuj aliĝi !
Yves Nicolas

Esperanto-programo de kastelo Greziljono en 2018

2018-maj-09/13 **Ĥora** (korusa) renkonto de Interkant' kun Zdravka Bojĉeva » rete gresillon.org/koruso

2018-maj-09/13 **ReVe**, Renkontiĝo Vegana, kun prelegoj, kursoj, filmoj, koncerto de Jonny M » rete gresillon.org/reve

Somera programo 2018 rete gresillon.org/somero

2018-jul-09/27 **Maratona** Esperanto-kurso dum 18 tagoj kun Perla Mielo, Louis Jeuland, Nina Danylyuk, Mikaelo Bronŝtejn

2018-jul-09/16 **Interŝanĝoj de scioj kaj faroj** kaj Esperanto-kurso » rete gresillon.org/s1

2018-jul-15/21 **Semajno de ĉiĉeronado** en la regiono Anĵuo kun Catherine Kremer » rete gresillon.org/s0

2018-jul-16/21 **Speciala** semajno kun kursoj de Esperanto kaj de la franca lingvo » rete gresillon.org/s2

2018-jul-21/27 **Internacia E-Konferenco** de OSIEK "Esperanto en Artoj" » rete gresillon.org/s3

2018-aŭg-11/19 **Festa Semajno** por infanoj kaj familioj » rete gresillon.org/s4

2018-okt-26/nov-03 **AŬTUNE** la Esperanto-ferioj - kun halovena festo kun Dennis Keefe

Esperanto-Kulturdomo et kastelo Greziljono

kontakto: kastelo@gresillon.org
telefono: +33-2.41.89.10.34



Impresoj de Bernard, la suzafonisto.

Per tiu teksteto, mi, la "pumpumisto" de nia triopo, volas doni iujn impresojn pri nia turneo en Normandio. Unue, dankegon al la organizantoj pro la gastigado kaj bonvenigado en la tri lokoj kie ni koncertis. Ni estis vere dorlotitaj. Mi certas, ke miaj kompanoj kaj akompanantinoj ne kontraŭdiros min. Koncerne tiujn lastajn vortojn, ni konstatis ke oni povas vortludi senvole, malkovrinte ke, pro senduba printeraro, nia grupeto iĝis "La KAmpanoj" sur afiŝoj kaj flugfolioj.


Kaj tio preskaŭ veras, ĉar du el ni loĝas en kamparo, eĉ meze de arbaro, en lokoj foraj, malvarmaj kaj sovaĝaj. Mi apenaŭ troigas ! Famo dum la spektaklo jam ŝerce rakontis pri la teruraj kondiĉoj kiun mi travivas en Aveyron. Do eble iam ni iĝos la kampanaj kompanoj (kun akompanantinoj). Dum nia restado, ni ankaŭ profitis la okazon por turismumi kaj viziti, preĝejo de reĝino Matilda en Caen, (trafa aludo al la kanzono de Brel kiun ni ne kantis pro rifuzo de la komponisto, ne kampanisto, ĉu ne?), Brodtapiŝo de Bayeux kaj Mont St Michel. Do, mia ĝenerala sentado pri tiu restado en Normandio estas muzike, spektakle, etose, gastigade, turisme kaj amikece ege agrabla. Plue, mi esperas ke niaj koncertoj spegulis pozitivan bildon pri Esperanto al la neesperantista publiko kiu ĉestis kaj instigos ilin lerni nian lingvon.

Amuzike,

Bernardo Legeay.

Kiam restas am' nur

(Jacques Brel, 1956. E-o : Georgo Lagranĵ,
Marcelo Redoulez, FaMo)



1 Kiam restas am' nur
Kiel dona mesaĝ'
Por la granda vojaĝ'
De la am-aventur',

5 Kiam restas am' nur
La unika rezon'
La unika kanzon'
Kaj unika sekur'...

9 Kiam restas am' nur
Kiel voj-signalont'
Por destino-alfront'
Je ĉiu strat-angul',

2 Kiam restas am' nur
Kara por mi kaj vi
Por ke dum tuta viv'
Regu ĝoj' kaj plezur',

6 Kiam restas am' nur
Por ke en frumaten'
La povrul' sen mantel'
Vestu sin per velur',

10 Kiam restas am' nur
Por parol' al kanon'
Kaj nur unu kanzon'
Por konvink' de tambur',

3 Kiam restas am' nur
Por unika promes'
Sen alia riĉec'
Krom la fid' pri futur',

7 Kiam restas am' nur
Kiel sola ofer'
Al la terosufer'
De simpla trubadur',

11 Tiam sen io krom
La forteco de Am'
Kusos en nia man'
Amik' la tuta mond' !

4 Kiam restas am' nur
Por meblad' per fortun'
Kaj kovrado per sun'
De l' tristec' en suburb',

8 Kiam restas am' nur
Proponebla al ĉi
Tiuj, kies konsci'
Serĉas lumon trans mur',





Hérouville-Saint-Clair

52 homoj ĉeestis la koncerton de « La Kompanoj » en la plenplena « Café des Arts » de Hérouville-Saint-Clair kun kiu ni ofte kunlaboras. Post la spektaklo, multaj esprimis sian ĝojon kaj faris demandojn pri Esperanto aŭ babilis kun la artistoj. Ili ĝuis la belajn kantojn kaj ŝatis la tre ofte amuzajn komentojn de Famo, Pierre kaj Bernard.

«Ouest-France » bone informis la aranĝon kaj Brigitte havis la bonan ideon reklami ĝin en la retpaĝo « On va sortir » -OVS- kiu venigis 17 homojn. 20 homoj kune manĝis post la koncerto en tre amika etoso.

Yves Nicolas

Avranches

Estis granda plezuro akcepti « La Kampanoj »-n en Avranches kiuj sin esprimis simple, humure kaj kore. Kvankam estis granda veto kanti tekstojn de Brel en Esperanto, la tri muzikistoj talente sukcesis revivigi la faman kantiston tra belaj muzikaranĝoj kaj voĉkoloroj. La 45 ĉeestantoj, majoritate ne esperantistaj, entuziasmiĝis dum la tuta spektaklo. Dank'al la voĉoj de Famo, Bernard kaj Pierre, ili iusence aŭdis Brel mem kaj povis ekscii pri la lingvo per la traduko de ĉiu kanto samtempe legebla sur ekrano.

Post la spektaklo, ni vizitis la kafejon de Rose sur la placo de l'Bazaro. Rose senpage trinkregalis nin kaj tuj ludis akordeonon. Ankaŭ Famo uzis ŝian muzikilon por kanti kelkajn francajn kanzonojn kaj havis grandan sukceson kun la klientoj de la kafejo. Rose, siavice, estis « en la ĉielo kun la anĝeloj » !

Tri lokaj gazetoj « La Manche Libre », « La Presse de la Manche » kaj « Ouest-France » per sia anonco kontribuis al la sukceso de tiu koncerto kiun organizis la solidarema asocio « Essen.sel » (kiu en 2017 ankaŭ akceptis la preleganton Duncan Charters. Ni povas esperi aliajn kunlaborojn, estonte).

Véronique Bessin kaj Patrick Etienne.



flers Agglo

Atelier langues et Cultures



Expo :
Du 9
au 17
mars
2018
Médiathèque
de FLERS

Atelier : Mardi 13 mars 2018
18 h 30

Concert : Les Kompanoj
« Jacques Brel en Esperanto »
Jeudi 15 mars 2018 - 19 h
Maison d'activités Saint-Michel
FLERS

GRATUIT
OUVERT À TOUS
SUR INSCRIPTION

Maison d'activités Saint-Michel
25 rue du Mont Saint-Michel
61100 FLERS
02 33 62 33 10 - 02 33 98 22 00
flers-agglo.fr



La grupo de Flers havis pluraspektan programon de la 9a ĝis la 17a de marto pri Esperanto. Ĝi organizis tutsemajnan ekspozicion en la « Médiathèque » kaj atelieron por prezenti la internacian lingvon la 13an de marto. 12 homoj spektis la koncerton de « La Kompanoj ». La bela afiŝo por reklami la aferon, kreita de la urbodomaĵ instancoj, atestis pri bonaj kaj longaj rilatoj de la klubo kun la lokaj asocioj kaj urbodomo. De tiu kunlaboro ni esperas baldaŭajn kaj belajn fruktojn !

Anne-Marie Leprévost

« La farĉitaj krespoj », de Brigitte Cottin

MJAM ! MJAM !

Ingrediencoj : unu advokado, iomete da estragona pulvoro, du supkuleroj da oliva oleo, suko el unu citrona duono, kvardek gramoj da butero, salo kaj pipro.

Ingrediencoj por la krespa pasto : 4 supkuleroj da maiza faruno (proksimume sesdek gramoj), unu ovo, unu glaso da lakto (proksimume dudek centilitroj), tri supkuleroj da fandita butero, salo.

Preparo :

Preparu la krespan paston : en ujo, miksu la maizfarunon kun la ovo kaj unu pinĉaĵo da salo. Aldonu iom post iom la lakton kaj la fanditan buteron daŭre movigante per mankirlilo. Lasu ripozi la paston dum unu horo je ĉambra temperaturo.

Duonigu la avokadon (forprenu ĝian kernon), senŝeligu kaj dispecigu ĝin. Miksu la pecojn kun la citrona suko, la oliva oleo, la estragono, salo kaj pipro. Miksu la tuton dum tri minutoj per elektra miksililo.

Metu en la fridujon la avokadŝaŭmaĵon.

Unu horon poste, kuiru la krespojn en pato. Lasu ilin malvarmiĝi.

Kelkajn minutojn antaŭ la surtabligo, metu centre de ĉiu krespo unu supkuleron da avokadŝaŭmaĵo, ŝmiru ĝin, volvu la krespon kaj metu ĝin en pladon.

Vi povas surtabligi la farĉitajn krespojn kiel entreon aŭ dum aperitivo.



KRUCVORTOJ de Madeleine Guionie (14)

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
A												
B												
C												
D												
E												
F												
G												
H												

Horizontale : A- Ekstera signo de ĝentileco – La unua duono de virina antaŭnomo. B- Brando – Entenanta objekto – Personpronomo. C- Prefikso kiu signifas “nur unu” – Komenco de la stato de plenkontenteco – Artikolo. D- Kortbirdo. E- Unua kaj tria literoj de itala urbo – Tinĉjo donas al vi du konsonantojn – Kiu ne povas aŭ ne volas paroli. F- Virbovo – Tre ŝatata dum la plensomero. G- Maljuna – 3 vokaloj troveblaj en la ĉokolado. H- Malgranda – Vin kaj min.

Vertikale : 1- Monato. 2- Sufikso por grupo, kolektivo – Prefikso kiu montras la kontraŭon.

3- Satelito de nia planedo – La 3 lastaj literoj el tempopasigo de infanoj. 4- Sufikso sen difinita senco por precizigi radikalon – Komenco de

traduko. 5- Duono de Toto – Sufikso kiu signifas : « membro de grupo ». 6- Diminutivo. 7- Bela akva floro. 8- Malne – Iomete el mono. 9- Blanka kaj tre bela birdo, emblemo de Paco. 10- Kun « o » fine de tiu vorto, nomo de planedo el la suna sistemo. 11- Necesas ovoj por ĝin fari.

12- Posesiva pronomo – Malo de ekster.

Solve p.6

TIU AMO HAVAS NOMON

Dum bela vespero kun apudaj cikadoj, maljunulo sidas sur teraso kun sia edzino. Trinkante flavan aperitivan kies nomo famas, li subite flustras :

« Mi amas vin tiom, ke mi ne scias kiel mi povus vivi sen vi. »

Lia edzino, ne kredante siajn orelojn, tuj replikas :

« Ĉu tiuj paroloj venis de vi... aŭ ĉu estas via glaso da RICARD kiu paroligis vin ? »

« Estas mi kiu parolis al RICARD », sonĝeme respondas la edzo.

Christian LESVEQUE (50)



DOSIERO Ĝenerala Asembleo en L' AIGLE

KIAL KUNVENI EN L'AIGLE la 16an DE JUNIO ?

Neniam okazis Ĝenerala Asembleo de nia regiona asocio en L'Aigle, la ĉefurbo de « Pays d'Ouche », pro la distancoj sed ankaŭ pro la manko de tiea organizita movado. Tamen, antaŭ kelkaj jaroj (Ref. « NEB » n°261 de marto 2015), ni estis invititaj de Pascal Hébert, loka esperantisto, por organizi ekspozicion ĉe « Les hommes fourmillent », asocio homama kun interesaj projektoj. Ni elkovris ĉarman urbeton en « Pays d'Ouche », subregiono kiu etendiĝas de la nord-orienta parto de Orne ĝis la sud-okcidenta parto de Eure kun rimarkindaj montetaj pejzaĝoj, vastaj arbaroj, vizitindaj monumentoj, specifa industria kaj migra historio, famaj verkistoj kiel Grafino de Ségur kaj Philippe Delerm.

Plie, vizitinte « Manufacture Bohin », ni eksciis, ke ties kreinto proponis internacian lingvon kaj interesiĝis pri Esperanto.

Entute : bela urbeto + agema surloka samideano + solidarema asocio + tre vizitinda uzino kun tre originala fondinto : jen argumentoj sufiĉe indaj por organizi ĝeneralan asembleon. Sed baldaŭ pliaj aferoj evidentiĝis por decidigi nin : el “Pays d'Ouche” kaj la proksima “Perche” migris multaj normandanoj ĝis Kebekio.. ĝuste de kie venos niaj gastoj por prelegi kadre de turneo en Francio !

Ni resumu : ĝis nun « ne esplorita » parto de Normandio, kunlaboremaj esperantisto kaj asocio, unika kaj kaptoplena fabriko de kudriloj kaj aliaj pingloj, akcepto de kebekano kies propra nomo estas « Normand ». Ĉu tiom da argumentoj jam vin konvinkis partopreni nian kunvenon la 16an de junio ? Ĉu vi volas plian ? Jen : ni kunvenos en jurto, granda kaj bela jurto kies ekzotikaj formo kaj koloroj forte kontribuos al internacia etoso !

Ni konkludu : vi sidos, manĝos kaj esperante babilos en rondforma, tola kaj transportebla domo kiun ankoraŭ uzas tre foraj popoloj, vi partoprenos tre riĉan kaj buntan programon, vi aŭdos la belan kebekan akĉenton kaj interŝanĝos kun Zdravka, kroate devena.

Ha ! Mi forgesis : vi povos aĉeti la plej famajn kudrilojn el la mondo por, kompreneble, baldaŭ kudri... grandan flagon por via klubo. Ktp, ktp !

Tuj-tuj, vi aliĝu kaj ni kune kantu : Vivu la Stel', vivu la Stel', vivu la Verda Stel'... en L'Aigle la sabaton 16an de junio !!!



LA PROGRAMO DE NIA ĜENERALA ASEMBLEO EN L'AIGLE, La SABATON 16an de JUNIO 2018

09h00 : Akcepto. Trinkaĵoj kaj kuketoj.

09h45 – 11h15 : Ĝenerala Asembleo. Morala kaj buĝeta raportoj. Renovigo de la estraro. Projektoj.

11h30 – 12h15 : Prelego de **Normand Fleury** (en la franca) :
« La forêt au secours de l'humanité ? ».

12h30 – 13h30 : Surloka tagmanĝo preparita de Alexandra kaj Franck.

13h45 : Foriro al la « **Manufacture Bohin** ».

14h00 – 16h00 : Vizito de la fabrikejo Bohin.

16h30 – 17h00 : Prelego de **Laurent Dutertre** pri «L'émigration percheronne du XVII^e siècle au Canada ».

17h15 – 18h00 : Prelego de **Zdravka Metz** (en esperanto) : « Kiel volontulado helpas integriĝon en nova lando ».

18h00 : Ĝis Revida trinkaĵo.

Nous serons accueillis par « Les hommes fourmillent »

« Les hommes fourmillent » est une association de projets alternatifs qui a vu le jour à L'Aigle en 2008. Elle s'est d'abord installée au cœur de la ville en y développant des activités ludiques et d'initiation à l'informatique dans un cadre convivial et de solidarité où on mangeait bien tout en participant à des débats, des conférences, ou en visitant une exposition d'artistes locaux. Elle s'est fixée dès le départ comme objectif d'encourager « l'instauration d'un nouvel état d'être dans les espaces urbains et ruraux et à mettre en forme un développement local, dans lequel le ou les autres sont considérés comme agents essentiels de développement ».

L'association s'est installée récemment sur les hauteurs de L'Aigle. Elle y sera plus à son aise pour accueillir des stages d'éveil à l'environnement, au jardinage biologique, au bien-être, etc.

Lors de notre visite préparatoire, Alexandra Mantopoulos et Franck Ginisty, deux de ses principaux animateurs, nous ont fait découvrir un lieu très champêtre où des moutons paissent dans un verger, tout près des yourtes où nous serons accueillis. Calme et environnement verdoyant garantis pour notre Assemblée Générale !

Dans la maison attenante, « Les hommes fourmillent » accueille et développe une bouquinerie solidaire dont le principe est basé sur l'économie circulaire. Des livres de seconde main sont mis à la disposition des lecteurs qui deviennent, s'ils le désirent, à leur tour animateurs de cette bibliothèque participative. Vous pourrez, vous aussi, vous y détendre quelques instants lors de notre AG.

« Les hommes fourmillent » fourmille d'idées et de projets (éducation à l'environnement, éco-tourisme, spectacles). Venez en parler avec eux le 16 juin.



Franck et Alexandra

Solvo de la krucvortoj de Madelaine :

Horizontale : A : saluton – ol(Olga) ; B : rumo – ujo –mi ; C : mono – fel – la ; D : anaso ; E : muta ; F : taŭro – ombro ; G : olda ; H : eta – nin.

Vertikale : 1 : marto ; 2 : aro – mal ; 3 : luno – udo (ludo) ; 4 : umo – tra ; 5 : to – ano ; 6 : eta ; 7 : nufaro ; 8 : jes ; 9 : kolombo ; 10 : omleto ; 12 : lia – en.

Morala Raporto 2017

Nia regiona asocio konsistas el pli-malpli 70 membroj jam de kelkaj jaroj malgraŭ forpaso de pluraj membroj. En 2017, ĝi eldonis 3 bultenojn (enpaĝigis ilin Michèle Langeois (14)). Kursoj okazis en Le Havre, Hérouville-Saint-Clair, Flers kaj Granville kaj provo en liceo de Coutances.

La ĝenerala asembleo okazis en Flers kun partopreno de 35 homoj kaj prelegoj de Zef Jegard (fama biciklisto « Papy fait le tour du monde » kaj Mikaelo Bronŝtejn el Rusio). La lokaj esperantistoj organizis tre agrablan aranĝon en etoso muzika kaj amika.

La ĉiu-jara turisma tago okazis en oktobro en Hérouville kaj Caen kun 35 homoj kiuj ĝuis vigan sunon. Tiu tria turisma tago konfirmis, ke tia aranĝo estas ŝatata, do denove farinda.

La 16an de septembro, 18 esperantistoj ĉeestis la koncerton de « Githarpo » (Lino Markov) en la preĝejo de Saint-Pierre-Langers (apud Granville).

Prelegis la usonano Duncan Charters en Hérouville kaj en Avranches en kunlaboro kun loka interhelpa asocio (SEL).

En Hérouville, prelegis Guilherme Fians (el Brazilo) kaj Brigitte Piedfert, loka verkisto, pri sia romano « La poupée catalane » kies esperantistaj herooj baraktas dum la Hispana Milito.

Prezidanto : Yves Nicolas (14)

Kasisto : Sylvie Caron (76) (post la subita forpaso de Jean Colombel (Montivilliers, 76) en februaro)

Sekretariino : Anne-Marie Leprévost (61)

Aliaj estraranoj : Françoise Glémot (50), Christian Lévesque (50), Barthélémy Maurau (27), Matthieu Lecesne (76).

Yves NICOLAS

RAPPORT BUDGETAIRE 2017

Recettes : 820 €

Il s'agit des cotisations perçues et de quelques dons.

Les adhésions sont stables au cours des années malgré les décès : 2014 : 71 ; 2015 : 71 ; 2016 : 72 ; 2017 : 70.

Dépenses : 989,67 €

La principale dépense est liée, comme les années précédentes, à l'édition de trois numéros annuels du bulletin normand (impression, frais postaux) : 554,61 €. Soit une dépense moyenne de 170 € par bulletin.

La seconde dépense est liée aux frais de tournées et d'AG (Duncan Charters à Avranches et Mikaelo Bronŝtejn à Flers) : 288,56 €

Remboursement des frais de déplacement (CA, L'Aigle) : 110,00 €

Frais de gestion du compte postal : 36,50 €

Comparaison des soldes de fin d'année sur le CCP : 2015 : 2378,07 € ; 2016 : 2388,07 € ; 2017 : 2070,35 €

L'année 2017 accuse une diminution de son solde de CCP en comparaison avec les années précédentes. Cela tient à des dépenses supérieures aux recettes (169,67 €) et sans doute à un règlement de la cotisation annuelle de la part de certains adhérents plutôt en janvier qu'en décembre.

Sylvie Caron.

LISTE DES ADHERENTS 2018 (mise à jour au 25 avril). Si votre nom n'y figure pas, c'est un oubli de notre part... ou de la vôtre* ! Merci à toutes celles et à tous ceux qui permettent, par leur adhésion, à notre association d'éditer un bulletin et de financer d'autres projets.

B Badmington Janine (76), Beliaeva Olga (Rusio), Berlot Yvonne (76), Besneville Annick (50), Bessin Véronique (50), Bony Odile ou Philippe **C** Caron Sylvie (76), Chalm Alain (76), Chaplain Michèle (61), Clément Martine (50), Cottin Brigitte (14), **D** Danvy Jean-Pierre (50), Dubois André (14), Dufeu Patrice (76), Dufresne Bernard (76), Duval Danielle (14), Duval Evelyne (76), **E-F** Etienne Patrick (50), Ferrand Claude (14), Fortin Francine (14), Freslon Philibert (Fr), **G** Gibert Gaél (14), Girard Véronique (14), Groult Jean-Christophe (14), Guérault Ginette (76), Guillemet Jacqueline (50), Guilmot Robert (76) **H-J** Hébert Pascal (61), Hubert Madeleine (14), Jéhénne Nicole (14), Jouvin Pierre (76) **L** Langeois Michèle (14), Lardeur Maurice (14), Le Breton Yvette ou Jean (14), Lebrun Nicole ou Rémy (27), Lecarrie Auguste (50), Leguillon-Décosse Marie-Hélène (14), Lemarchand Pierre (76), Lemeltier Marcel (50), Leroy Dominique (76), Letessier Jean-Pierre (14), Levesque Christian (50), Loisel Denise (Fr), Longuet Jeanine (14), **M-N** Magerel Jean ou Guionie Madeleine (14), Marie Françoise (14), Martin Aline (14), Maurau Barthélémy (27), Mulot Annick (50), Nicolas Yves (14), **P** Paumier Michelle (14), Peyroitte Dominique (14), Piedfert Brigitte (14), Piette Marie-Anne (14), **Q-R** Quillaud Pierre (76), Robiolle Pierre (50), Rousseau Henri (14), Rousseau Jeanine (Fr), **S-T** Sauvage Jean-Pierre (14), Schertzer Jeanne (50), Sénécal Odile ou Gérard (14), Thierry Marie (14), Troisgros Rémi (50).

*Chèque de **10 €** à l'ordre de « **Espéranto Normandie** » à envoyer (avec vos coordonnées postale, téléphonique et internet) à Sylvie Caron, 44 rue Gustave Lennier, 76600 Le Havre.

ZDRAVKA KAJ NORMAND, EL KEBEKIO, PRELEGOS EN L'AIGLE

Zdravka Metz kaj Normand Fleury konkludos dusemajnan prelegvojaĝon, nome de Esperanto France, en L'Aigle. Ni tre ĝojas ilin akcepti en «Pays d'Ouche » de kie migris multaj normandanoj al Kebekio.

Zdravka Metz naskiĝis en Kroatio en 1952, kie ŝi vivis en Varazdin kaj Zagrebo. Ŝi lernis Esperanton en mezlernejo kaj aktivas en la movado de la 70-aj jaroj. Ŝi diplomiĝis pri ekonomio en Zagrebo. Post edziniĝo al Kanadano Normand Fleury, ŝi translokiĝis al Montrealo en 1982. Tie, post lernado de la franca lingvo, ŝi diplomiĝis pri socia laboro kun enmigantoj. Ŝi laboris dum 15 jaroj kiel respondeculo pri volontula servo en komunuma organizo. Dum libera tempo, ŝi ŝatas verki en Esperanto. Ŝi verkis aŭ kunlaboris por eldono de kelkajn librojn kiel "Bestoj en nia domo", "Vivprotokoloj", "30 jaroj da agado", "Kristnaskaj Rakontoj", kaj aliaj. Ŝi fieras pri siaj du denaskuloj Damir kaj Mira Metz-Fleury.

Pri la prelego de Zdravka Metz (en esperanto)

Kiel volontulado helpas integriĝon en nova lando.

Zdravka Metz mem spertis kiel estas enmigri novan landon kaj kulturon kun nova lingvo. Ofte oni ne konsideras aŭ taksas ke volontulado povas transformi ies vivon. Volontuli povas esti multe pli grava sperto ol simple helpi sian malsanan najbaron. Pere de volontulado, iu povas, depende de sia celo, pli facile integriĝi en novan socion, trovi manieron vivteni sin aŭ same grave, senti sin feliĉa aŭ utila. Ŝi prezentos sian vivsperton kiu portis ŝin al nova profesio, de ekonomia fako al socia laboro kun volontuloj kaj handikapuloj.



L'ancienne province du Perche, du Perche-Gouët
et leurs communes actuelles.

Normand Fleury naskiĝis en Granby, Kebekio en 1956. En 1979 dum 3 jara restado en Eŭropo, li malkovris Esperanton kaj aktivas en la movado de tiam. Li diplomiĝis en hortikulturo kaj ĝardeno planado. Sian karieron li pasigis ĉefe laborante en la Montreala Botanika Ĝardeno sed ankaŭ kiel teknikisto pri parkoj por la urbo Montrealo. Li prelegas de pluraj jardekoj pri plantoj, ĝardenoj kaj birdoj. Li edziĝis kun Zdravka Metz el Kroatio. Ili edukis siajn 2 infanojn trilingve. Li estras la LKK-on por la venonta UK-o en Montrealo en 2020.

Pri la prelego de Normand Fleury (en la franca)

Kiel arbaroj povus savi homaron ?

Iam la arbaroj kovris preskaŭ duonon de la tersurfaco. Kiel estas la situacio nun ? Pli kaj pli akvo kaj aero malpuras sur la tero kaj kaŭzas ekologian katastrofon. Kial mi pensas ke arbaroj estas grava ŝlosilo por solvi tiujn urĝegajn problemojn surtere ? La prelego prezentos ekzemplojn dise tra la mondo.

[illegible]

Quelle visite touristique au mois d'octobre ?

Après Le Havre, Granville et Caen, quelle visite ?

vos parents ? votre ville ? votre coin de campagne ? votre bord de mer ?

Contactez Yves Nicolas au 06 44 87 22 48

L'émigration percheronne du 17ème siècle au Canada par **Laurent Dutertre**, historien local

Passionné d'histoire locale et de valorisation du patrimoine, Laurent Dutertre fait régulièrement des conférences et des visites guidées de monuments (abbaye de Saint Evroult, Forge d'Aube, Musée de la Comtesse de Ségur ...) ou de villages anciens. Il effectue également souvent des recherches en archives départementales sur certains sujets, en ce moment sur l'histoire du protestantisme dans les anciens duchés d'Alençon et comté du Perche. Laurent Dutertre interviendra de 16h30 à 17h00 lors de notre Assemblée Générale.

Les 15ème et 16ème siècles voient naître l'élan des grandes découvertes. Les Européens entreprennent de reconnaître de nouvelles voies maritimes à destination de l'Asie. En fait, c'est un continent insoupçonné qui s'ouvre à eux, l'Amérique, leur apportant alors des perspectives inédites d'échange et d'exploitation.

Ainsi, en 1534, lors de son premier voyage, le malouin Jacques Cartier explore les rives du Saint Laurent, le grand fleuve du nord. Et bientôt, cet immense espace découvert devient la Nouvelle France. Certes, les débuts sont assez modestes : établir un comptoir servant uniquement à la pêche et à la traite des fourrures. Puis, avec le temps, des aventuriers traversent l'Atlantique afin de s'y installer définitivement, parfois avec femmes et enfants. En 1608, la ville de Québec est fondée. Et en 1627, le Cardinal Richelieu crée la Compagnie des Cent-Associés, dirigée par Samuel de Champlain. Sa mission est alors d'assurer le gouvernement et la défense de ce vaste territoire, tout en favorisant son essor démographique et commercial.

Si bien qu'au cours du 17ème siècle, plusieurs milliers de colons français viennent s'établir en Nouvelle France, augmentant ainsi considérablement sa population. Et c'est dans ce contexte que 308 Percherons décident d'émigrer. Sous l'impulsion de Robert Giffard, médecin apothicaire de Tourouvre, et des frères Juchereau, plusieurs convois partent de Mortagne pour embarquer à Dieppe. Attirés par la possibilité d'une vie différente, avec des terres à défricher et cultiver, ces Percherons, accoutumés à l'environnement forestier, contribueront donc à la colonisation du Canada. Car aujourd'hui, 1 500 000 Canadiens sont les descendants directs de ces 308 ancêtres fondateurs, issus de 33 paroisses du Perche.

Aussi, je vous invite à découvrir la passionnante histoire de ces aventureux qui ont tout quitté pour se rendre dans un monde inconnu où tout était à bâtir.




Nous visiterons la Manufacture Bohin.

Créée en 1833, la Manufacture Bohin est la dernière en France à fabriquer des aiguilles et des épingles. Une quarantaine de salariés contribue à son développement. La qualité de ses réalisations est de réputation mondiale. Elle compte 4500 références à son catalogue distribué dans plus de 35 pays. L'entreprise se positionne sur deux secteurs : les outils de la confection et les attaches pour la papeterie.

Au cours de la visite, nous suivrons les nombreuses étapes de la fabrication d'une aiguille en découvrant un savoir-faire ancestral, des outils rudimentaires et des machines très ingénieuses, parfois datant de plus d'un siècle.

La Manufacture Bohin, financée par la Région Normandie, est aussi un lieu de sensibilisation au patrimoine industriel du Pays d'Ouche qui, le long de la Risle, a développé durant trois siècles une industrie métallurgique très importante. Elle présente régulièrement des expositions temporaires d'intérêt culturel comme celle, du 21 avril au 29 juillet, « Du rouge garance au bleu horizon, l'Art textile revisite la Grande Guerre ».

Deux heures de visite très riches et étonnantes, à ne pas manquer !



BENJAMIN BOHIN, auteur du « Patoiglob »

Benjamin Bohin s'inscrit pour participer au Congrès Universel de 1906 (Genève) en donnant une adresse qui, à première vue, semble fantaisiste : « Benjamin Bohin, Bohinville par L'Aigle ». Des recherches sur internet, corrigent rapidement notre première impression. Cette adresse correspond en fait à l'usine édifée par Benjamin Bohin au « Moulin à Vent » de L'Aigle (61) en 1856. Sa renommée locale lui donne bien le droit, sur ses vieux jours, de créer une ville, ou un lieu-dit, à son propre nom !

En effet, en 1906 Benjamin Bohin, âgé de 84 ans, (relayé par son fils Paul depuis 1877), est à la tête d'une industrie florissante de fabrication d'aiguilles pour machines à coudre et autres épingles de sûreté. Au début du XXe siècle, les usines de tréfilerie Bohin embauchent 600 salariés et produisent par an 400 millions d'aiguilles et 3 millions d'épingles. Depuis 1952, Bohin est l'unique fabrique d'aiguilles en France.

Benjamin Bohin est un personnage haut en couleurs. Connu pour son génie industriel et ses inventions (L'entreprise reçoit une médaille d'or à l'Exposition Universelle de 1889 pour la qualité de ses aiguilles. Il est l'inventeur, en 1890, de la première machine automatique de montage des épingles de sûreté.), il porte sur le monde et sur la vie un regard humaniste et original, tout en étant marqué par son époque, qu'il présentera en 1898 dans d'étonnants « Versets modernes » et « Quatrains modernes ».

Au cours de plusieurs voyages, dont l'un autour du monde, il élabore, et éditera en 1898, une langue universelle, le « Patoiglob », « Syllabaire moderne universel, moral, industriel et commercial », « en vente à l'imprimerie de Bohinville par L'Aigle ».

« J'ai par expérience, dans mes longs voyages en Europe, Asie, Afrique, Amérique, reconnu comme tout le monde combien il serait utile et agréable de pouvoir universellement se faire comprendre et enfin sortir de la langue mimique, ou pantomime, obligatoire pour avoir seulement son nécessaire à l'étranger ».

Bien que mesurant l'étendue de la tâche : « Ce travail m'est d'autant moins facile que je ne suis qu'un ouvrier parvenu qui n'a pas l'habitude de la plume comme celle du marteau », Bohin pense utile de proposer son projet. « Il y a une dizaine d'années, Le Volapuck a sombré malgré tous les avantages qu'on lui supposait, ainsi que tous grands principes littéraires, etc. Aujourd'hui, en 1898, L'Esperanto vient de paraître ; on dit qu'il a beaucoup d'espérance et de facilité... ».



Le Patoiglob est un français simplifié présenté sous la forme d'un dictionnaire que les espérantistes compareront volontiers au Fundamento de leur langue. « Ce dictionnaire doit être la loi à suivre rigoureusement pour chaque idiome, lequel dans chaque nation, doit être traduit, suivant chaque mot en lettres latines sans k, q, x, y, z. Par exemple le mot

chapeau qui est inscrit **at**, l'Anglais écrira **hat at** en regard du mot **at** ; Espagnol, **sombrero at**, et l'Italien, **capella at**, (...). Comme il n'est besoin que de quelques milles (sic) mots pour se comprendre, la traduction en sera bientôt faite ».


L'alphabet latin se limite à 20 lettres. « Afin que l'imprimerie et l'écolier soient facilités, j'ai supprimé également les majuscules, les accents, etc ; nous avons même poussé l'arbitraire dans le seul intérêt des écoliers Orientaux, Africains et autres, jusqu'à supprimer le genre féminin, etc ». « Les académiciens diront que **c'est du barbarisme et les écoliers répondront tant mieux**, surtout l'écolier Africain et Asiatique dont les parents ne connaissent que l'écriture de leurs ancêtres, laquelle est d'une telle difficulté, qu'en Chine, il y a dit-on, des étudiants de tout âge et même de plus de cinquante ans. »

« Pour arriver à ce but, nous avons choisi dans les dictionnaires français, anglais, américain, allemand, espagnol, italien et russe, environ deux mille mots, lesquels sont indispensables pour parler comme petit nèg e, pensant bien que l'avenir en ajoutera plutôt que d'en supprimer aucun ».

En effet, « (...) le Patoiglob n'est pas destiné à la littérature, mais bien à l'usage du commerce, du télégraphe et des voyageurs universels, marins, soldats et colons ».

A partir du Patoiglob, né du français simplifié, chaque nation créera un patoibr « dans chaque nation civilisée (...) on pourra créer un patois libre avec le même alphabet en plaçant le mot rectifié en face du Patoiglob (...) et toujours en petit format de poche. Ces petits dictionnaires de poche, avec traduction de chaque idiome, en quelques milles mots seulement, permettront de mieux comprendre par la lecture, et on pourra s'écrire, plus ou moins bien, puisque chaque mot sera lisible en lettres latines et en écriture de chaque idiome traduit. »* (*nous avons respecté l'écriture originale dans toutes les citations)

Son projet n'aura aucun écho. Cependant, huit années après avoir proposé le « Patoiglob », Benjamin Bohin reste très intéressé par l'idée d'une langue internationale. Résolument optimiste, ouvert et curieux malgré son grand âge, il s'inscrit donc au deuxième congrès universel d'espéranto. Nous ignorons son degré de connaissance de la langue de Zamenhof et s'il s'est rendu réellement à Genève. Il meurt en 1911 à 89 ans.



Deux exemples de « Catrins modernics » :

Les Impo

Les tacs de al tim av des detractor
Les religion les roi etre les inventor
Partou il fo païe les administrations
Les armi e les shefs in als nation

Les impôts

Les impôts de tous temps ont eu des détracteurs
Les religions, les rois en sont les inventeurs
Partout il faut payer les administrations
Les armées et les chefs en toutes nations

Le Var

Var a le var il fo lui morir de fin
An sem le malheur il eat notr pin
An defrandr son barn at als gran couraj
Un patriot devoir se defandr ouit raj

La guerre

Guerre à la guerre, il faut qu'elle meure de faim
En semant le malheur elle mange le pain
En défendant la grange on a tous grand courage
Un patriote doit se défendre avec rage



« Café Polyglotte » en Hérouville-Saint-Clair



En Hérouville-Saint-Clair, iniciatis novan kulturan proponon la kinejo "Café des Images" kaj la urbo.

Temas pri interkultura renkontiĝo ĉirkaŭ lingvoj. Ĉar multaj naciecoj kunvivas en la urba komunumo, kial ne renkontigi parolantojn de tiom da fremdaj lingvoj? El tiu simpla ideo naskiĝis "Plurlingva Kafejo" ("Café Polyglotte" en la franca).

Krom la iniciatintoj (kinejo kaj urbo) aliĝis la municipa biblioteko, "Erasmus and Internationals in Caen", "MDE Hors-les-Murs" kaj kompreneble Hérouville Espéranto.

Kun granda sukceso okazis la unua Plurlingva Kafejo, la 17an de januaro en la kafeterio de Café des Images. Multnombraj venis homoj el diversaj landoj, precipe junuloj, kiuj portempe vagadis de lingvo al lingvo. De la angla al la germana, de la hispana al la sveda, de la itala al la portugala, de la ĉina al la franca aŭ la esperanta.

Kelke da tempo poste, la plejmulto de la studanta ĉeestantaro elektis sian propran aŭ la nunan lernatan lingvon kaj daŭre sidis en sia preferata rondo. Kelkaj scivolemuloj, ne nur junuloj, interesiĝis pri esperanto. Du-tri el ili jam aŭdis paroli pri la internacia lingvo, aliaj tute ne. La kvar anoj de nia asocio plezure klarigis kaj respondis la demandojn.

La etoso de tiu unua renkontiĝo estis tre agrabla. La sekva, laŭdire estis iom tro bruema sed pro alia kialo. La ĉeesto en la kinejo de Isabelle Huppert, ĉirkaŭita de televida teamo, okazigis neatenditan eferveskon!

La marta renkontiĝo kunigis malpli da homoj ol la januara. Ĉi-foje mi ne rimarkis vagemulojn. Krom du personoj kiuj nenion sciis pri esperanto kaj interese aŭskultis nian prezentadon, ŝajnas ke la aliaj tuj trovis la lokon kie oni parolis pri sia dezirata lingvo.

Konklude kaj miaopinie, partopreni en tiaj renkontiĝoj perfekte indas. La ĉeesto de esperanto plene rajtiĝas, plene rajtiĝas, samnivele apud aliaj lingvoj pli uzataj.

Venontaj datoj de la Plurlingva Kafejo:

- 18a de aprilo ekde la 19a, en Café des Images
- 19a de majo ekde 14:30 en la Biblioteko
- 13a de junio ekde la 19a, en Café des Images

Gérard Sénécal (14)

INSCRIPTION A L'ASSEMBLEE GÉNÉRALE DE L'AIGLE DU 16 JUIN

(cette feuille est à retourner IMPÉRATIVEMENT avant le 30 mai)

Nom et Prénom :

Adresse postale :

Adresse internet et numéro de téléphone (de préférence portable) :

.....@..... Tel



Nombre de personnes :

Avez-vous des difficultés de locomotion (l'accès à la yourte, légèrement pentu, peut nécessiter de l'aide) ? :

: - : - : - : - :

Repas (Vin rouge ou rosé, eau minérale) **15 € tout compris** :

Participerez-vous au repas (entourez d'un cercle votre réponse) ? : OUI NON

Menu 1 : salade piémontaise, poulet froid, salade verte, fromage, tarte aux pommes.

Menu 2 : salade niçoise, rôti de porc froid, salade verte, fromage, tarte aux pommes.

Etes-vous végétarien (s) ? OUI NON

(le plat principal végétarien des menus 1 et 2 sera : Tarte au fromage et salade verte

Quel menu choisissez-vous (à détailler pour chaque personne) ?

MENU 1 : OUI Nombre de personnes :

MENU 2 : OUI Nombre de personnes :

MENU végétarien OUI Nombre de personnes :

: - : - : - : - :

VISITE DE L'USINE BOHIN (10 € par personne)

Participerez-vous à la visite de l'usine Bohin ? OUI NON

: - : - : - : - :

ENVOYEZ VOTRE REGLEMENT AVANT LE 30 MAI

Repas (15 € par personne) : 15€ x..... = €

Usine Bohin (10 € par personne) : 10€ x..... = €

Total à régler = €

L'inscription et votre règlement par chèque à l'ordre de « Espéranto Normandie ») sont à retourner **avant le 30 MAI** à :

Anne-Marie LEPREVOST :

62, rue de la 11è DB Britannique, 61100 Flers. Tel : 02 33 65 41 81

Renseignements par internet : lepam.flers@gmail.com

Avant ou au cours de cette Assemblée Générale vous pourrez aussi régler votre cotisation (si vous ne l' avez déjà fait) à

Sylvie Caron 44 rue Gustave Lennier. 76600 Le Havre

à l' ordre de **Espéranto Normandie**